Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

2024.4

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn

Translima tramo Strasburgo - Kehl

Estimataj gelegantoj

Finfine venis somero – tempo de ferioj, libertempoj, vojaĝadoj kaj ripozo. En nuntempa eldono de nia revuo ni preparis por vi kelkajn sugestojn – eblojn kiamaniere pasigi liberan tempon. Sur paĝo 82 vi povas trovi invitojn al interesaj lokoj en Eŭropo. Se vi ne volas vojaĝi tro multe – jen kelkaj proponoj por fervojamikoj – germanaj fervojmuzeoj:
La DB-muzeo en Nürnberg, Koblenz kaj Halle – kun interesaj ekspozicioj, prezentaĵoj kaj programoj. Detalojn vidu je:
https://www.dbmuseum.de/museum_de/Unser_Haus/oeffnungszeiten_und_preise-2599166
Alia interesa muzeo de *VSE – Verein Sächsischer Eisenbahfreunde e.V.* – detalojn vi trovos je:
https://www.vse-eisenbahnmuseum-schwarzenberg.de/index.php/museum
Amantoj de vaporlokomotivoj povas viziti ankaŭ *Sächsisches Eisenbahnmuseum Chemnitz-Hilbersdorf e.V.*:
https://www.sem-chemnitz.de/museum/#oefnungszeiten/
Vere interesaj muzeoj ne nur fervojaj estas en *Kassel*:
La Teknika muzeo *Kassel* : www.tmkkassel.de
Kaj la *Henschel*-muzeo en *Kassel*: www.henschel-museum.net
Mi esperas, ke vi trovos inter niaj proponoj interesan celon de viaj someraj vojaĝoj.

Via redaktoro

Enhavo:

Salutvortoj por la solena inaŭguro – Strasburgo, 09.05.2024..... 64
Protokolo pri la publika komitatkunsido 64
Raporto pri la eksteraj rilatoj en 2023..... 72
La 76-a IFK, *Žilina*, Slovakio, 30.04. – 03.05.2025..... 74
EEK kaj 75-a IFEF-kongreso en Strasburgo 76
Vizito de la bontenejo de regionaj trajnoj en Strasburgo 80
Ferio sur reloj..... 82
Atentigo !!! 84
Amuza anguleto..... 84

Titolpaĝo: Foto: Jaroslav Matuška

Internacia Fervojisto
Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro
Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF
Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) prezidantino@ifef.net
Sekretario: Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net
Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net
Redaktoro: Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net
Gvidanto de la Faka Komisiono: momente neokupita

Membroj de la Redaktora Komisiono
Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

Membroj de la Faka Komisiono
Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net
Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

Bank-Konto:
Nomo: „Laurent Vignaud”
IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237
BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net
Facebook: https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372

Salutvortoj por la solena inaŭguro - Strasburgo, 09.05.2024

Saluton, karaj geamikoj, nome de mi persone kaj nome de ĉiuj fervojistoj esperantistaj ĉeestantaj, aŭ ne.

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio estas inter la kunlaborantaj asocioj, kiuj dekomence akceptis la inviton por kunkongresi en Strasburgo.

Indas akcenti, ke la organizantoj elektis vizie la temon ĉirkaŭ-debati, nome: „Dialogo inter popoloj, portanto de paco”...

Ĉar ne povas esti alia pli aktuala temo en la nunaj cirkonstancoj, kiam la militemo reviglas, kiam abomenaĵoj kaj krimoj, kiuj konsternigas nin, okazas tute apude.

Kaj ne povus esti pli bona ekzemplo ol la hodiaŭa komuna kongreso de pluraj asocioj, ke la universala lingvo kreita de Zamenhof estas la plej bona kaj taŭga batalilo por la efektivigo de nobla ideo de interkompreniĝo, kaj ke la esperantistaro funkcias super ĉiaj disdividoj por konservi la rilatojn sen iu ajn antaŭjuĝo.

Mi certas, ke la planitaj prelegoj, debatoj kaj aliaj programeroj, kiuj kovros vastan gamon de temoj, alportos al ni ne nur fakajn avantaĝojn, sed ankaŭ neforgeseblajn travivaĵojn en tiu speciala etoso de urbo kaj regiono, kiuj gastigas riĉan kulturon, amason da arkitekturaj belaĵoj, mirindajn pejzaĝojn, kaj integriĝan diversecon el pluraj vidpunktoj.

Mi volas gratuli kaj tutkore danki la organizantojn de tiu renkontiĝo pro la invito kongresi ĉi tie, en Strasburgo, la ĉijara tutmonda ĉefurbo de la libro, laŭ propono de UNESCO.

Samtempe mi deziras al ĉiuj gepartoprenantoj sukcesan laboron kaj la plej agrablajn memoraĵojn el tiu restado en belega Alzaco.

Rodica TODOR, Prezidantino de IFEF

PROTOKOLO PRI LA PUBLIKA KOMITATKUNSIDO (plenkunsido)

en la 75-a IFEF-kongreso en Strasburgo (FR) 09.05.2024

Mallongigoj: Pr = prezidanto, Sk = sekretario, Ks = kasisto, Rd = redaktoro, e-o = estraro, Ĉk = ĉefkomitatano, anst Ĉk = anstataŭanto de Ĉk, IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka Komisiono, TS = Terminara Sekcio, FAS = Fake Aplika Sekcio, Gv = gvidanto de FK, k-o = komitato, k-ano =

komitatano, kk-ano = kromkomitatano, k-go = kolego, Hm = honora membro, Hp = honora prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j). (Landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO 3166)

1.Malfermo, konstato de la mandatoj

La prezidantino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.
Ĉeestas la estraranoj:

Pr-ino Rodica TODOR	(RO)
Sk Vito TORNILLO	(IT)
Ks Laurent VIGNAUD	(FR)
Rd Ladislav KOVÁŘ	(CZ)
Ĉk Zlatko HINŠT	(HR)

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

	Lando	Kodo	Komitatano	Anstataŭanto
01	Aŭstrio	AT	Ernst QUIETENSKY	neniu
02	Belgio	BE	Marc CUFFEZ	
03	Bulgario	BG	Petja ALEKSANDROVA	Angel MAGLOV
04	Ĉeĥio	CZ	Ladislav HAKL	
05	Francio	FR	Christian DARDENNE	
06	Germanio	GE	Bodo EHRLICH	
07	Germanio 2	GE	Andreas DIEMEL	
08	Hispanio	ES	Carlos SPINOLA	neniu
09	Hungario	HU	István GULYÁS (Hm)	Marta PINTER
10	Italio	IT	Vito TORNILLO	
11	Kroatio	HR	Zlatko HINŠT	
12	Pollando	PL	Wiesław LIBNER	
13	Rumanio	RO	Rodica GIUHAT	
	Ĉeesto de 10 kn	9 l.a.	rajtas 13 komitatanoj	

2. Ricevitaj mesaĝoj

Mesaĝoj legitaj dum la malfermo de la plenkunsido:
La Sk transdonas la salutojn de la Honora Prezidanto Romano Bolognesi.

3. Honorigo al la mortintoj

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 74-a IFK-Antverpeno 2023 ĝis la 75-a IFK-Strasburgo 2024.
Oni honorigas ilin per unuminuta silento; ili ripozu pace.

	Antaŭnomo	Fam.nomo	Naskdato	Mortdato	Aĝo	Menciindaĵo
AT	Thomas	HAFNER	25.02.1951	03.04.2023	72	
BE	Adrienne	VANHOLDER De Sutter	05.09.1924	28.10.2023	99	Vidvino de Lucien De Sutter
CZ	Květuše	KAFKOVÁ	07.08.1923	10.03.2023	99	
FR	Denise	LOISEL		--.02.2024		
FR	Ginette	BIZERAY		--.03.2024		
DE	Martin	KASBERG	27.11.1930	22.06.2023	92	
HU	Imre	FERENCZY	25.07.1932	01.09.2023	91	
IT	Gino	CORSO	31.10.1926	01.11.2023	97	Iama red. kaj sekr. de IFEA
IT	Egisto Umberto	BORGHINI	15.09.1953	25.11.2023	70	
HR	Marija	VUKUŠIĆ	23.08.1927	05.02.2024	96	
SE	Gunnar	OLSSON	03.07.1935	25.10.2023	88	

4. Estraranaj raportoj

4.1. Sekretario kun resumo de la jarraportoj 2023 el la landaj asocioj

La Sk legas la raporton pri la jaro 2023. La raporto aperis en IF 2024-3. Neniu demando, nek rimarko. Ankaŭ la resumo de jarraporto de Landaj Asocioj estas legata, ĝi aperos en IF 2024.5. La punktoj pri agado kaj estonteco de IFEF instigas diskuton inter la partoprenantoj. Respondoj al la demando kion fari por revigligi IFEF, ĉefe inter la junuloj, venas de Andreas Diemel. Laŭ lia sperto oni devus pripensi ŝanĝi la kongreson, jam laŭnome, al pli moderna organizado, kiel renkontiĝo kun allogaj ofertoj al la partoprenantoj, simila al jaraj kulturaj renkontiĝoj, kiuj altiras la intereson de centoj da homoj. Pro la ĉiama malkresko de la nombro de fervojistoj kaj kresko de la nombro de amikoj de fervojo en nia membraro, revenas la ideo malfermi IFEF al ĉiuj transportistoj. Ĝi restas daŭra temo pridiskutota dum la kunveno IFEF-Movadaj Aferoj.
Raportoj ambaŭ aprobitaj.

4.2. Redaktoro

La Rd resumas la raporton, kiu aperis en IF 2024-2. Li informas ke la eldono kaj sendado de la bultenoj estis regule faritaj. En la jaro 2023 aperis entute 6 numeroj de la revuo Internacia Fervojisto kun entute 120 paĝoj (136 paĝoj en la jaro 2022). Temoj de la publikigitaj artikoloj estas kompare kun antaŭaj statistikoj preskaŭ la samaj; nove aperis du artikoloj

pri agado de FISAIC. La plej multnombraj estis kontribuaĵoj pri agado de la Federacio (raportoj, kongres-informoj kaj Verden-informoj). Post tiuj sekvas artikoloj pri teknikaj interesaĵoj. Iomete kreskis la nombro de artikoloj pri agado de l.a. sed tamen ĝi ne sufiĉas por krei imagon pri la situacio en niaj asocioj.
Raporto aprobita.

4.3. Kasisto

La Ks prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj la kasistan raporton kiuj aperis en IF 2024.2.
Ankaŭ en 2023 la profito estas granda pro tio, ke malfondiĝante la landa asocio en Slovenio donacis 2000 eŭrojn al IFEF.
Belgio IFK 2023: Temas pri alpruntoj subtene al organizado de la IFEF-kongreso kaj postkongreso en Belgio en Majo 2023. En la jaro 2023 IFEF rericevis la tutan sumon.
En ĉiuj landaj asocioj la membronombro stabilas aŭ iomete malkreskas. Nur en Belgio la membronombro kreskis (de 15 al 23).
Raporto aprobita.

4.3.1 La kasisto ne prezentis la kasbilancon al la revizoroj, kiuj tial ne povis kontroli la kontojn.

5. Diskuto kasraporto-bilanco 2023/buĝeto 2025, kotizkonfirmo

Estas konfirmataj la du membrokotizoj: 9 eŭroj por reta sendo de la revuo, kaj 15 eŭroj por papera sendo de la revuo. Raporto aprobita.

6. Protokolo plenkunsido IFK 2023 Antverpeno

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolon, ĝi aperis ankaŭ en IF. Unuanime aprobita.

7. Raporto de la ĉefkomitatano

La raporto de la Ĉk aperis en IF 2024-2 kaj estas sendita al la landaj asocioj. Dum la jaro 2023 la ĉefkomitatano plenumadis siajn taskojn. La Ĉk tamen esprimas opinion pri la enhavo de la demandilo kaj de ties respondo fare de la landaj respondeculoj, kiuj ne plenumas ĝin laŭ la indikoj de la demandilo. Raporto aprobita.

8. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)

8.1 Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)

Jaroslav Matuška legas la raporton de la FAS.

En la jaro 2023 estis preparata la numero 32-a de FFK kun 6 artikoloj de 7 aŭtoroj el 6 landoj. Ĝi enhavas ankaŭ 2 kontribuaĵojn prezentitajn dum projekto VERDEN. Aŭtoroj estas V. Ronin (ĉefa prelego dum 74-a IFK), G. Brandenburg, R. Giuhat, Z. Hinšt, V. Tornillo, M. Berka kaj J. Matuška.
Fakaj prelegoj estis prezentataj dum la IFEF-kongreso, Verden-renkontiĝoj, UK en Torino kaj en aliaj retaj kaj ĉeestaj kunvenoj. Kelkaj membroj de la FK preparis fakajn artikolojn/informojn por IF.
Raporto aprobita.

8.2 Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)

La Sk de TS, Guido Brandenburg raportas pri la laboro de la terminologia grupo en *UIC*, precipe pri la datumbanko *RailLexic*. Dum la jaro 2023 li preparis Terminaran Kurieron n-ro 160. En Februaro la Terminara Komisiono renkontiĝis rete por diskuti terminarajn proponojn. Dum la kongreso en Antverpeno la komisiono kunvenis. La kontaktoj kun *UIC* kaj ties terminologia grupo estas bonaj. Roman Štěrba el *FISAIC* aperigis artikolon pri prelegoj prezentitaj dum la seminario en Pardubice, en la angla, en la retpaĝo de *UIC*.
Raporto aprobita.

9. Raportoj de la komisiitoj

9.1 Komitatano „A" de IFEF ĉe UEA.

La IFEF-Pr-ino Rodica TODOR prezentas raporton pri sia posteno ĉe UEA kaj klarigas pri la taskoj kaj la ĝis nun farita laboro de la UEA-komitato. Retaj diskutoj okazas dum la tuta jaro.
En la UK en Torino, la pr-ino kaj la sk partoprenis la Movadan Foiron, kie ili renkontiĝis kun multaj homoj el ĉiuj landoj. IFEF havis spacon ankaŭ por la Fervojista kontaktkunveno, kiun partoprenis dekoj da esperantistoj. Estis prezentataj prelegoj pri IFEF kaj ĝia agado, fervojaj temoj.

9.2. Rilatoj al aliaj organizoj: *FISAIC*; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF

FISAIC: bonaj rilatoj, IFEF estas membro de *FISAIC* kaj la reprezentanto partoprenas regule la kunsidojn.
Pro familiaj aferoj, la Pr-ino ne povis ĉeesti la Ĝeneralan Asembleon de *FISAIC* en Danio, sed ŝi sendis detalan raporton pri la agado de IFEF. Sekve la diskutojn de la pasinta ĜA en Strasburgo, la Pr-ino informis pri la eblo organizi retan Esperanto-kurson por la *FISAIC*-reprezentantoj pere de la

angla. Al ĉiuj reprezentantoj de landaj sekcioj estis sendata informo pri tiu reta kurso, kiun ofertas la londona Esperanto-klubo.

Ĉeestis la ĜA en *Aarhus* kelkaj membroj de IFEF, nome Andras Barcsa (repr. Hungario), Veselka Kamburova (repr. Esperanto Bulgario) kaj Jan Niemann kiel helpanto de la organizanta *FISAIC*-sekcio de Danio.

SAT: Funkcias interrilatoj de membroj de ambaŭ asocioj. Multaj niaj membroj estas ankaŭ membroj de SAT kaj okazas interŝanĝoj de la bultenoj de niaj asocioj. Nia membro Bruno Henry salutis nome de SAT la kongreson.

ILEI: Kun ĝi estas bonaj rilatoj. Membroj de ILEI partoprenas la kongreson kaj prizorgas la E-kursojn. Kunlaboras Kristin Tytgat kaj Luigia Oberrauch ankaŭ por la projekto „Erasmus+".

UMEA: Menciindas personaj kontaktoj de la du prezidantoj, interŝanĝo de publikaĵoj kaj informoj.

ISAE: La situacio en la asocio ne estas klara, estas problemoj pri agado kaj reorganizado.

TAKE: La rilatoj estas bonaj. TAKE ĉiujare proponas eldonon de faka bulteno pri konstruado. André Grossman invitas la IFEF-membrojn viziti la retpaĝon de TAKE por elŝuti la bultenojn.

IKEF: La Pr Ĉielismo ĉiam informas pri la agado en diversaj kampoj. Kelkaj IFEF-membroj partoprenas la kutiman dimanĉan IKEF-renkontiĝon, dum kiu la Pr-ino kaj la Ĉk prezentas prelegojn pri IFEF kaj aliaj temoj.

9.3 Fakdelegitoj ĉe UEA

La posteno aperas nur surpapere, fakte UEA ne prizorgas rekte pri la delegitoj. IFEF proponas al UEA ke IFEF estu la referenca asocio pri fervoja fako.

10a. Elektoj

10a.1 Konfirmo de la komitato pri elekto de Gvidanto fare de FK kaj ĝia sekretarioj.

Dum la kunsido de la Faka Komisiono estis konfirmita ke la posteno de Gvidanto de FK estas vaka. La komitato konfirmas la elekton.

10a.2 Konfirmo de komitato pri elekto de Sekretarioj fare de FK

Dum la kunsido de la Faka Komisiono estis reelektita Guido Brandenburg en la posteno de Sekretario de Terminara Sekcio kaj Jaroslav Matuška en

posteno de sekretario de Fake Aplika Sekcio. La komitato konfirmas la elekton.

10a.3 Elekto de la Ĉefkomitatano kaj Anstataŭanto de Ĉk

La du kandidatoj al la postenoj de Ĉefkomitatano, Zlatko Hinšt, kaj Anstataŭanto de Ĉk, Ladislav Hakl, estas unuanime reelektataj por la sekva trijara oficperiodo.

10b.Kongresproponoj

Dum pasinta periodo la komitato ricevis neniun kongresproponon.

11. Venontaj kongresoj

11.1 Konfirmo de la invito al la 76-a IFK en 2025 en Slovakio: *Žilina*.

La organizantoj de la venonta IFK en Slovakio, decidis okazigi la kongreson en la urbo *Žilina*, en la periodo de la 29-a de Aprilo ĝis la 3-a de Majo kun sekvaj du tagoj de postkongreso en Bratislavo kaj vizito de Vieno. Kiel kutime la kongreso estas prezentata dum la nuna kongreso, kun provizora programo kaj ebloj pri loĝado kaj ekskursoj. Dankon al Peter Baláž kaj al nia Individua Membro Magdaléna Feifičová.

La komitato unuanime aprobas.

11.2 Elekto de la lando por la jaro 2026 Serbio

La Serbia Esperanto-ligo oficiale invitas IFEF-n kongresi en Serbio en la jaro 2026.

Pri la kongresurbo kaj aliaj detaloj oni interkonsentos poste. Por la LKK: Jovano Zarkoviĉo Pr. de SEL kaj Nedeljka Loĵajiĉ, vicpr. de SEL. Dankon al ili pro la akcepto gastigi nian kongreson.

La komitato unuanime aprobas.

11.3 Propono pri la sekvaj jaroj en 2027, 2028.

La estraro esploras pri aliaj eblecoj.

12. Eventualaĵoj - Libera diskutado - Nenio.

Libera diskutado pri la situacio kaj la estonto de IFEF estas prokrastata al la kunveno Movadaj Aferoj (Dimanĉon je la 9:00-10:00).

13. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF, dum la kunveno Movadaj Aferoj

13.1. Situacio en kelkaj landoj

La legado de la resuma raporto de landaj asocioj evidentigis la malfacilajn rilatojn kun kelkaj asocioj, multaj ne respondas kaj ne donas sufiĉajn informojn pri la agado.

Dum la kunsido, kiam ĉiuj povas libere interŝanĝi opiniojn kaj sugestojn pri la vivo de IFEF, kelkaj gravaj temoj estas pridiskutitaj:
- la Ĉk insistas pri la neceso sendi ĝustatempe la raportojn de la l.a. kaj anonci ek de la komenco de la jaro la kalendaron de la jaraj renkontiĝoj aŭ aliaj eventoj organizataj de la l.a., por faciligi la ĉeeston de eksterlandaj gastoj;
- oni diskutas pri eventuala okazigo de alia renkontiĝo, krom la kongreso, ekz. „kultura semajno", al kiu estu invititaj ankaŭ nefervojistoj, aliaj transportistoj kaj ĉefe junuloj, por malfermi la federacion al ekstera publiko. Nenio konkreta.
Bedaŭrinde oni ne vidas rapidajn kaj efikajn solvojn por la daŭra malkresko de la membraro.

13.2. Raportoj de la laborgrupoj: raportas la Ĉk pri la internaj rilatoj kaj la situacio en kelkaj landoj (malfondiĝo de jure registritaj asocioj en Hungario kaj Slovenio).
Pri eksteraj rilatoj jam venis raportoj de la Pr-ino pri la agado je internacia nivelo: UEA, Verden, Universitato Pardubice, *FISAIC*.
Pri historio kaj arkivo de Jan Niemann ne venis informoj. Verŝajne l.a. konservas la materialon por si mem sen transdoni al IFEF.
Pri informado la grupo daŭre nutras la IFEF-paĝon kaj regule aperigas informojn en la sociaj retoj.
L. Hakl instigas sendi materialon pri la kunvenoj kaj renkontiĝoj antaŭ la okazo por reklami pri ili, kaj poste sendi raporton kun fotoj. Estus bone se la ifef.net-paĝo kaj la aliaj landaj asociaj retpaĝoj, estu ĉiam ĝisdatigitaj, por doni pozitivan impreson al vizitantoj pri vigla agado.
Pri instruado, oni proponas krei ligon inter la membroj por bona kono de la lingvo. IFEF petis de ILEI-membroj la disponeblecon de reta kurso favore al *FISAIC*-respondeculoj, kaj interesitoj, el la diversaj membro-landoj.

13.3. Strategia laborplano
Jaroslav Matuška kaj Ladislav Kovař prezentas la broŝuron "Verden", kiel finan rezulton de la projekto "Erasmus+" kun la temo "Daŭripova evoluo kaj transporto".
Oni pripensas tradukon en plurajn lingvojn por prezenti la projekton al diversaj fervojaj administracioj.

Necesas plifortigo de la kunlaborado kun pluraj E-asocioj kaj ĉefe havi rilatojn kun la junuloj de TEJO.
La Strategia laborplano estos prezentata al la landaj asocioj ĝis la fino de la jaro.
Monte San Pietro, 20.05.2024
Vito TORNILLO, la sekretario

Raporto pri la eksteraj rilatoj en 2023

La Pr-ino partoprenis kiel Komitatano A la 108-an UK Torino, en Aŭgusto 2023 (1230 aliĝintoj el 66 landoj), kaj ĉeestis en du kunsidoj de la Komitato de UEA kaj kvar komitataj forumoj.
1-a komitata kunsido, sabaton, 29.07.2023, oni diskutis kaj voĉdonis pri:

- Estrara jarraporto pri la agado en 2022;
- Spezokonto 2022; Bilanco 2022;
- Raporto de la komitataj reviziantoj pri 2022;
- Strategia Planado 2019-2022;
- Strategia Planado 2022-2025.

2-a komitata kunsido, vendredon, 04.08.2023, estis prezentitaj kaj aprobitaj:
- Raporto el la Komitata Forumo pri Kunlaboro;
- Raporto el la Komitata Forumo pri Informado;
- Raporto el la Komitata Forumo pri Rilatoj kun la ekstera mondo;
- Raporto el la Komitata Forumo pri Instruado;
- Buĝeto 2024 kaj poste; nuntempe oni konstatas bonan financan situacion de UEA;
- Baza kotizo 2024: la ĉefa informo estas, ke la membrokotizo por la jaro 2024 restos la sama.

Okazis ankaŭ:
Aprobo de naŭkapa Estraro de UEA:
Duncan Charters (Prezidanto) - Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado;
Fernando Maia Jr. (Vicprezidanto) - Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko;

Amri Wandel (Vicprezidanto) - Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko;
Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario) - Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo;
Aurora Bute - Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo;
François Lo Jacomo - Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Ĝemelaj Urboj;
Jérémie Sabiyumva - Aktivula Maturigo, Afriko;
So Jinsu - Eldonado, Azio kaj Oceanio
La komitato de UEA elektis novan estraranon, la naŭan, **Gong Xiaofeng** el Ĉinio.
Elekto de:
- 3 Honoraj Membroj: s-ino Anna Löwenstein, Britio; d-ino Katalin Kováts, Nederlando; s-ro Privas Tchikpe, Benino
- Honora Prezidanto: s-ro Renato Corsetti, Britio.
Estis akceptata Landa Asocio de Tanzanio – kiu intertempe komencis pretigi UK 2024 en Aruŝo;
Estis akceptata nova faka asocio pri Vikimedio.

Dum la UK en Torino la Pr prezentis la konkludojn de kunlabora projekto de IFEF per la prelego: „Verden - defioj, atingoj, konkludoj".

En ILEI kongreso 2023 en *Lignano Sabbiadoro*, Italio, la 8-an de Aŭgusto, per *Zoom*, la Pr-ino prezentis la projekton Verden en rilato kun instruado.

En Oktobro la Pr-ino ĉeestis la Hispanan Kongreson en *Sevilla*, kie ŝi salutis nome de IFEF la ĉeestantaron kaj informis pri la Eŭropa kongreso en Majo 2024 en Strasburgo, por varbi aliĝintojn.
Virtuala UEA Kongreso (23-24.11.2023).

La Pr-ino havis du intervenojn per *PowerPoint*-prezentadoj pri IFEF (ĝeneralaj informoj pri nia federacio) kaj pri unu el la plej gravaj projektoj en kiu IFEF kunlaboris en la lastpasintaj du jaroj - nome Verden.

Per reta korespondado oni diskutis kaj interkonsentis kun la lokaj esperantistoj pri la venontaj IFEF-kongresoj en la jaro 2025 (en Slovakio) kaj 2026 en Serbio.

Rodica TODOR, IFEF-prezidantino

La 76-a IFK, *Žilina*, Slovakio, 30. 04. - 03. 05. 2025

SAFE, Slovakia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, dum sia historio havis honoron gastigi du postkongresojn - *Žilina* [Ĵilina] 1991 (post la IFK en *Olomouc*) kaj *Tatranská Lomnica* 1997 (post la IFK en *Košice* [Košice]), du skisemajnojn (*Vrátna*-valo 1992 kaj *Tatranská Lomnica* 2001) kaj la Internacian Fervojistan Kongreson en la orientslovakia urbo *Košice* en la jaro 1997.

Venontjare vi denove havos eblon viziti nian belan landon. Ekde la 30-a de Aprilo ĝis la 3-a de Majo 2025 la 76-a IFK okazos en la kvara plej granda slovaka urbo *Žilina*, kuŝanta nordokcidente laŭ la plej longa slovaka rivero *Váh* kaj pro tio ofte nomata „perlo sur *Váh*“.

La kongreson ni organizos por vi kune kun la spertaj organizantoj de E@I – Edukado ĉe Interreto.

La kongresejo estos komforta hotelo Galileo troviĝanta en la loĝkvartalo *Hliny* apud la urbocentro. Ĝi estas tre bone atingebla de la trajna stacidomo, kaj haltejo de la urba trafiko estas tuj apud la hotelo. Memkompreneble, eblos uzi ankaŭ taksiojn.

Estas planataj tri duontagaj ekskursoj:

- al la historia urbocentro de la gasturbo kun ĝia kvadratforma Placo de Maria, ĉirkaŭita per arkadaj domoj; aŭ, alternative, la interesuloj povos grimpi al la urba montopinto *Dubeň* [Dubenj] kun la elrigardturo kaj de tie ĝui la rigardon al la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo;

- al la urba kastelo *Budatín*, kuŝanta en bela parko ĉe kunfluejo de la riveroj *Váh* kaj *Kysuca*, kun ekspozicio de objektoj de dratumista arto;

- al la pitoreska vilaĝo *Čičmany* [Ĉiĉmany], konata per sia unika arkitekturo – pentritaj lignaj trabkonstruaĵoj, krome per lokaj popolkostumoj kaj brodaĵoj kun geometriaj ornamaĵoj.

Merkredon la alvenintoj povos sur la urba placo spekti la feston de starigado de alta, riĉe ornamita Majo-arbo, kiun iam la junuloj starigadis antaŭ la fenestron de sia koramatino.

Dum la tuttaga ekskurso ni vizitos la ekspozicion de la 115-jaraĝa Mallarĝŝpura Elektra Fervojo de *Trenčín* (*TREŽ*) en *Trenčianska Teplá*, per ties „tramo“ ni veturos al la banloko *Trenčianske Teplice* [Trenĉianske Tjeplice] kaj posttagmeze ni veturos al nia ĉefurbo *Bratislava*, kie ni vizitos la Trafikan Muzeon apud la stacidomo.

La postkongresa tago estos dediĉita al la urbocentro kaj aliaj vidindaĵoj de tiu ĉi historie riĉa slovaka ĉefurbo.

La sekvan tagon oni povos aŭ reveturi hejmen, aŭ eluzi la proksimecon de la aŭstria ĉefurbo Vieno kaj viziti tie krom ĝiaj vidindaĵoj ankaŭ la Esperanto-Muzeon.

Kotizoj:	ĝis 31.12.2024	ĝis 31.03.2025	poste
- IFEF-membro aŭ A-lando:	€ 80	€ 100	€ 120
- B-lando aŭ familiano A-B aŭ junulo ĝis 30 j. A-B:	€ 40	€ 50	€ 60
- Ne IFEF-membro:	€ 100	€ 120	€ 140

Krompago por aliĝi surloke: € 10

Tranokto en la hotelo Galileo, en dulita ĉambro, kostos 27 EUR/persono/nokto. Tuttaga manĝo tie kostos 28 EUR. Ni klopodas prizorgi por vi ankaŭ studenthejman tranokteblon.

Estas preparata kongresa retejo https://ifef.ikso.net, kie baldaŭ aperos pluaj detaloj kaj la reta aliĝilo.

La LKK (Fejfi, Dorota, Petro, Sonja) kaj ĉiuj aldonaj helpantoj deziras al vi agrablan veturadon al *Žilina* 2025!

Provizora kongresa programo

Dato	Tago	Tempo	Programo
30.4.	merkredo	14:00	Alveno de partoprenantoj
			Publika programo ĉe la urba placo – starigado de Majo-arbo
		20:00	Prelego pri urbo *Žilina*
		21:00	Interkona vespero
		21:00	Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK
01.05	ĵaŭdo	09:30	Solena malfermo de la kongreso, komuna fotado
		11:00	Faka komisiono

		14:00	Piedekskurso tra *Žilina*, aŭ grimpado sur la lokan montpinton *Dubeň*
		20:00	Vespera programo
02.05	vendredo	09:00	Ĉefa prelego kaj aliaj prelegetoj
		14:00	Duontaga ekskurso al la kastelo *Budatín* apud *Žilina*
		20:00	Komuna vespero ĉe muziko
03.05	sabato	09:00	Publika plenkunsido
		11:45	Prezento de la 77-a IFK 2026 (Serbio)
		14:00	Duontaga ekskurso al *Čičmany*
		20:00	Solena fermo de la kongreso
		21:00	Komuna muzikumado
04.05	dimanĉo	09:00	Forveturo de kongresanoj al la tuttaga ekskurso aŭ hejmen - trajne al *Trenčianská Teplá* – vizito de la ekspozicio pri la 115-jaraĝa Mallarĝŝpura Elektra Fervojo de *Trenčín* (*TREŽ*), veturado per ties „tramo" al la banloko *Trenčianské Teplice* - trajne al *Bratislava* – vizito de la Fervoja Muzeo. Tranokto en *Bratislava*.
05.05	lundo		**Postkongreso** - vizito de vidindaĵoj de la slovaka ĉefurbo *Bratislava* Tranokto en *Bratislava*
06.05	mardo		Forveturo hejmen, aŭ survoja vizito de Vieno kaj de la Esperanto-Muzeo tie.

Paralele dum la faka programo okazos E-kurso por komencantoj (pri bazaj elementoj de la lingvo, depende de la aliĝoj de komencantoj) kaj konversacia kurso (kun gramatikaj aldonaĵoj).

Peter BALÁŽ, Magdaléna FEIFIČOVÁ

EEK kaj 75-a IFEF-kongreso en Strasburgo

Dum tagoj de la 8-a ĝis 12-a Majo 2024 okazis en Strasburgo granda Eŭropa Esperanto-kongreso kaj enkadre de ĝi ankaŭ la 75-a IFEF-kongreso. Temo de la kongreso estis „Dialogo inter popoloj, portanto de paco" – grava ideo por nuntempaj

cirkonstancoj. IFEF ne estis sola kunorganizanto, kiu tie kongresis. Okazis ankaŭ kunvenoj de ILEI, franca, germana kaj itala E-asocioj kaj aliaj. Entute partoprenis pli ol 600 partoprenantoj, kio rememorigis IFEF-kongresojn el pasinta jarcento. La kongreso okazis en Strasburga Universitato kie estis bonaj kondiĉoj organizi ĉiujn kunvenojn, atelierojn kaj diskutojn de unuopaj partneraj organizaĵoj, eĉ solenan inaŭguran kaj ferman festkunvenon, kiun partoprenis plej multe da partoprenantoj. Nur artprezentaĵoj okazis en koncertejo *Le Manège* fore de la universitato, sed facile atingebla per tramo. Unu tago estis dediĉita al ekskursoj.

La programo de la IFEF-kongreso estis iomete pli mallonga ol ĝi kutime estas, tamen ĉiuj necesaj kunvenoj kaj programeroj okazis laŭ statuto.

Dum la malferma ceremonio, kiu okazis la 9-an de Majo en la granda universitata amfiteatro *Cavaillès*, alparolis la publikon la prezidanto de LKK Bruno Flochon, prezidanto de UEA Duncan Charters kaj reprezentantoj de partneraj organizoj, inkluzive de la IFEF-prezidantino Rodica Todor. En sia alparolo ŝi substrekis la signifon de la komuna aranĝo por prezento de la ideo de interkompreniĝo. La publikon salutis pere de ekrano ankaŭ urbestrino de Strasburgo.

La inaŭgura ceremonio finiĝis per komuna kantado de la Eŭropa himno.

Tuj post la inaŭguro komenciĝis labora programo de IFEF per kunsido de la Faka komisiono. Kiel gvidanto de la Fake aplika sekcio estis reelektata s-ro Jaroslav Matuška por venontaj tri jaroj kaj Guido Brandenburg kiel gvidanto de Terminara sekcio. Guido Brandenburg en sia al-

parolo klarigis nuntempan situacion en terminara komisono de *UIC*, kiu ne estas facila. Ligilo al fervoja vortaro de UIC *RailLexic* daŭre ne estas publike ebla, nur per speciala aliro por IFEF, kiun prizorgas Guido Brandenburg. Li ankaŭ menciis ligilon al reta formo de PIV – www.vortaro.net. Jaroslav Matuška konatigis la partoprenantojn pri la laboro de la Fake aplika sekcio kaj pri faka programo dum strasburga kongreso. Li ankaŭ prezentis printitan broŝuron pri VERDEN-projekto, kies presigon li sukcesis lastmomente certigi antaŭ la kongreso. Bedaŭrinde la broŝuro ne enhavas tre interesan parton pri transporto de bicikloj en fervojo, kiun preparis Lars Sözüer el BEMI – Biciklista Esperantista Movado Internacia, kiu lastmomente retiriĝis de la projekto.

Sekva IFEF-programero estis plenkunsido ĵaŭde la 9-an de Majo. Ĝin partoprenis 12 delegitoj de landaj asocioj. La sekretario Vito Tornillo rememorigis pri la IFEF-membroj, kiuj forlasis nin dum la pasinta periodo, prezentis detal-vastan raporton pri agado de IFEF kaj anoncis la kandidatojn por venontaj IFEF-kongresoj: 2025 – Slovakio, Žilina, 2026 – Serbio. Detalajn raportojn de la redaktoro kaj de la kasisto vi povas trovi en IF 2024.2. Pluan diskuton gvidis IFEF-prezidantino Rodica Todor dum kiu oni diskutis pri plibonigo de IFEF-agado. Unu el instigoj estis publikigo de kalendaro kun datoj de jarkunvenoj en IFEF-landaj asocioj.

Detalajn informojn pri la plenkunsido vi povas legi en alia loko de la revuo.

Tuj post fino de la plenkunsido okazis akcepto de reprezentantoj el partneraj kunorganizantaj organizaĵoj de la EEK-kongreso en la strasburga urbodomo. La partoprenantojn salutis vicurbestrino s-ino Marina Lafay.

En la nomo de IFEF partoprenis la eventon prezidantino Rodica Todor kaj sekretario Vito Tornillo.

La sekva kongresa tago estis dediĉita al ekskursoj. Por kongresanoj estis preparitaj multaj vizitoj, trarigardoj kaj vojaĝoj. Grupeto de IFEF-anoj partoprenis viziton en lokomotiv- kaj vagonbontenejo de *SNCF*-fervojo *Technicentre Grand Est* – legu artikolon sur paĝo 80.

La laborprogramo de la IFEF-kongreso daŭriĝis sabaton posttagmeze per bloko de prelegoj kiun gvidis Jaroslav Matuška. La ĉefan prelegon kun titolo „Eŭropaj trajnoj kaj trajnrapideco” prezentis Hubert Peyrouty. Poste sekvis prelegoj de Bodo Ehrlich pri 175-jara produktado de lokomotivoj en *Kassel*, Guido Brandenburg prelegis pri fervojlinio de german-franca amikeco el *Freiburg* al *Colmar*, Ladislav Hakl konatigis ĉeestantojn pri rekonstruo de la ĉeĥa fervojstacio *Pardubice*. Interesan prelegon pri loka trafiko en franc-germana limregiono prezentis Andreas Diemel, Zlatko Hinšt parolis pri 100-jara datreveno de eldonado de faka revuo „La Fervojisto“ en Zagreb kaj je la fino estis prezentata prelego de Lene kaj Jan Niemann pri nova ponto *Storstrømsbroen* en Danlando. Kvankam aŭskultantoj preskaŭ perdiĝis en granda salono n-ro A 04 de la universitato, estis ĝojige, ke la programon partoprenis eĉ kelkaj ne IFEF-anoj.

Kaj venis lasta tago de la kongreso – dimanĉo. El la IFEF-programo restis du aranĝoj – Movadaj Aferoj kaj prezento de la venontjara kongreso en Slovakio. Dum Movadaj Aferoj oni diskutis krom aliaj aferoj pri demandilo, *Zoom* – abono ktp.

La kongres-urbon *Žilina* de la 75-a IFK en la jaro 2025 prezentis perrete Magdalena Feifičová. En sia bildprezento ŝi montris al ĉeestantoj la urbon

mem, cel-lokojn de ekskursoj kaj kongresejon en hotelo Galileo. (Legu artikolon sur paĝo 74.)

Dum tagmezo okazis solena fermo de la EEK en amfiteatro *Cavaillès*. Grandan aplaŭdon meritis ĉiuj, kiuj forte laboris por preparo de la komuna kongreso.

Mi ne volas forgesi ankaŭ kulturan programon de la kongreso. Ĝi ĉefe okazis en salono *Manège*. Dum tri duetapaj vesperoj (ĉiu prezentaĵo estis ripetata pro multe da ĉeestantoj) povis kongresanoj ĝui spektaklojn de Klarisa, Ralph Glomp, Jonny M kaj aliaj. Okazis eĉ prezentaĵoj dum programpaŭzoj (duopo Kajto), ekspozicioj, libroservo kaj aliaj.

Ladislav KOVÁŘ

Vizito de la bontenejo de regionaj trajnoj en Strasburgo

Por kongresanoj estis preparitaj multaj vizitoj, trarigardoj kaj vojaĝoj. Grupeto de 12 IFEF-anoj el 6 landoj (BE, CN, CZ, DE, FR, HR) partoprenis viziton en lokomotiv- kaj vagonbontenejo de *SNCF*-fervojo „*Technicentre Grand Est*" en Strasburgo. La ekskurson prizorgis Bruno Henry kiu interpretis por la partoprenantoj interesan priskribon de laboro en la bontenejo. Tra vasta trakaro kaj laborhaloj gvidis nin dungitoj de la centro.

Tie oni bontenadas diversajn regionajn pasaĝertrajnojn:

- La plej faman „*TER 200*" kiu estas la komerca nomo de apartaj regionaj pasaĝertrajnoj, cirkulantaj inter Strasburgo kaj Bazelo. Tiuj *TER*-trajnoj,

uzas *Corail*-pasaĝervagonojn kiuj kapablas atingi 200 km/h, dum la rapido de aliaj *TER*-trajnoj ne superas 160 km/h. La elektraj lokomotivoj kiuj tiras aŭ puŝas la trajnojn estas la tipo *BB 26000*. La lokomotivestro, kiu kondukas la trajnon, situas en la lokomotivo aŭ en la pasaĝervagono kun kondukistejo.

- Ni vidis ankaŭ malpli rapidajn regionajn trajnojn *TER* kiuj atingas 140 km/h. Ili enhavas 3 pasaĝervagonojn de tipo *RRR* (reverseblaj regionaj trajnoj) „*Rames Réversibles Régionales (RRR)*” trakciitaj aŭ puŝitaj per elektra lokomotivo *BB 22200* aŭ dizela lokomotivo *BB 67400.*

- La plej moderna trajno kiun ni vidis estas la grandkapacita motorvagono *AGC „Automoteur à Grande Capacité*” kies elektraj ekipaĵoj, klimatiziloj kaj aerujo estas sur la tegmento. Ĝi kapablas atingi 160 km/h.

La fervojistoj uzas diversajn instalaĵojn kaj ilojn kiel pontetojn aŭ fosaĵojn por ripari supre aŭ malsupre

la veturilojn. Servas pontoj sur reloj kiuj transportas lokomotivojn de trako al alia trako laŭbezone.

La gvidantoj tre insistis pri la sekureco kiam ni paŝis sur la vojoj inter la trakoj pro eventuala movo de veturiloj.

Oni emfazis ke la bontenado de trajnoj estas grava por sekureco kaj akurateco de trajnoj.

Bruno HENRY

Ferio sur reloj

Alproksimiĝas la feria sezono kaj, sendube, por multaj el ni unu el la plej belaj manieroj feriadi estis kaj restas vojaĝi per trajno. Ĝi estas pli ol maniero iri de A al B, estas okazo malkovri kaj esplori, elektante la specon de trajno, kiu plej taŭgas por nia aventuro.

Estas tiom multe por vidi de la trajnofenestro! Nia kontinento estas plena de pitoreskaj vojoj, kiuj ofertas mirindajn pejzaĝojn.

Ĉu vi volas alveni tien tre rapide? Kiel sonas ĝis 300 kilometroj hore? Ĉar ekzistas larĝa reto de grandrapidaj eŭropaj trajnoj, kiuj rapide kondukas al la celloko, sed ili haltas nur en ĉefaj urboj.

Fonto: https://www.oravita-anina.eu/ro/traseu.php

Se vi volas vidi fascinan eŭropan celon, estas konstruitaj fervojoj tra la plej sovaĝaj kaj malfacile alireblaj regionoj. Eŭropo havas multajn legendajn fervojojn, precipe en la areo de la Alpoj, fervojoj kiuj, kiam ili estis pretaj, estis veraj inĝenieraj mirindaĵoj, ĉar ili mallongigis al horoj-distancoj, kiujn oni kutimis vojaĝi en tagoj. Pejzaĝoj, montoj, viaduktoj, arbaroj, maroj kaj lagoj, malnovaj stacidomoj.

Svislando estas la eŭropa lando kie homoj vojaĝas plej ofte per trajno, kaj ĝi ankaŭ havas la plej alte situantan fervojan stacidomon de Eŭropo. La *Glacier Express, Bernina Express* kaj *Jungfraubahn* estas legendaj fervojoj.

La balkana areo havas plurajn referencajn fervojojn: unu en la monta areo de Montenegro, spektakla en Grekio, sed ankaŭ ĉe la kroata marbordo.

La fervoja linio *Oravița–Anina* en Rumanio (1863) estas la unua montfervojo en sudorienta Eŭropo.

En Norvegio estas belega itinero *Oslo - Bergen* kaj ekde *Myrdal*-montstacio, la trajno kondukas vin malsupren al *Flåm* tra la plej longa kaj profunda fjordo de Eŭropo - *Sognefjorden.* La vojaĝo pasas tra kruta kaj mallarĝa *Flåm*-valo kun vidoj de spektaklaj akvofaloj kaj montopintoj, la trajno haltas ĉe la plej impresaj lokoj, inkluzive de la akvofalo *Kjosfossen*.

Fonto: *Kjosfossen – European waterfalls*

Skandinavio prezentas ankaŭ tre longan vojaĝon preter la Arkta Cirklo de Stokholmo al *Narvik*.

Fonto: *Guide to riding Scandinavia`s Vy Natgag train*

Francio havas pitoreskajn fervojojn en la areo de Pireneoj, en Korsiko kaj ĉe la Lazura Bordo, kaj en Hispanio estas historia fervojo proksime de la ekstrema sudo de la lando.

Germanio riĉas je fervojoj plenaj de mirindaj pejzaĝoj en la montara regiono Harco, sed ankaŭ proksime de la rivero Rejno.

Se ni vekis vian intereson pri feriadi per trajno, sciu ke vi povas malkovri ĝis 33 eŭropajn landojn per *Interrail Pass* https://www.interrail.eu/en

La *Interrail Global Pass*-karto ofertas la eblon de senlima vojaĝo en 33 eŭropaj landoj, de Skandinavio ĝis Turkio kaj maraj transiroj inter Italio kaj Grekio. La validecperiodo de la identigiloj estas de kvar tagoj ĝis 3 monatoj,

pasaĝeroj havas liberecon elekti la itineron dum la vojaĝo. La oferto de *Interrail Global Pass* validas ankaŭ en la tuta loĝlando, por rondveturo.
La oferto de *Interrail One Country Pass* validas por la sekvaj landoj: Germanio, Britio, Hispanio, Aŭstrio, Francio, Benelukso (Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio), Irlando, Nord-Irlando, Italio, Estonio, Grekio, Ĉeĥio, Hungario, Portugalio, Bulgario, Kroatio, Norda Makedonio, Latvio, Litovio, Pollando, Serbio, Slovakio, Slovenio, Rumanio kaj Turkio.
Rodica TODOR

Atentigo !!!



- IFEF-estraro ankaŭ en tiu jaro prizorgis abonon de Zoom aliro. Ĝin povas uzi landaj asocioj, komisionoj, laborgrupoj por sia laboro dum jaro. Informu vin ĉe IFEF-sekretario Vito Tornillo.

- En tagoj 24. – 27.09.2024 okazos fervoja foiro INNOTRANS 2024 en Berlino.

Amuza anguleto



Enskribu silabojn!

1) Gasa formo de akvo
2) Densa suko el fruktoj
3) Subtera parto de planto
4) Dezerta besto
5) Birda simbolo de paco
6) Manĝebla planto
7) Aŭstria lando
8) Buŝa likvaĵo

Helpo: TIROLO

Preparis **Ivan POTIŠKA**, solvo de enigmo el n-ro IF 2024.3: EN ARBARO SIDAS ARBOJN NE VIDAS